

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2021-07-15 ĝis 2022-10-15.

## **Eventoj**

### **Kongreso-2022**

La 55a ILEI-Kongreso okazis tute virtuale kun la titolo “La 3-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI” (VEKI-3), de la 23a ĝis la 30a de julio 2022. La temo de la Kongreso kaj de la Simpozio estis: “Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado”. Estis bedaŭrinde, ke la Kongreso ne povis okazi kiel planite en Kebekurbo, Kanado, pro la daŭraj malfacilaĵoj vojaĝi kaŭze de la kovima pandemio. Sed la virtuala kongreso estis granda sukceso de publiko. Ĝi donis la eblecon ankaŭ al homoj, kiuj kiel ajn ne povintus iri al Kebekurbo pro ekonomiaj aŭ aliaj kialoj, senpage ĝui grand-skalan internacian Esperantan eventon. Ĝi ankaŭ ebligis eksperimentan, pli publik-centran aliron, kiu donis la eblecon al la prelegantoj elekti la temon de sia prelego aŭ diskutrondo laŭ la ĉefa cel-publiko, kiun ili volis atingi. Sed Kanado restis simbole nia ideala “sidejo”, dank’ al la prezentado de Kebekurbo fare de la prezidantino de ties LK, Suzanne Roy. La ĉef-organizanto de la ĝenerala parto de VEKI-3 estis estraranino pri kongresoj Laura Brazzabeni kun la helpo de la vicprezidantino Alessandra Madella.

La programo estis tre ampleksa: dum 8 tagoj estis 33 prelegoj fare de 33 prelegantoj, 8 diskutrondoj, 6 koncertoj kaj unu filmeto. Ĝi legeblas en la retejo (<https://www.espero.ir/eo/veki-3/>) speciale kreita de irana inĝeniero Hamzeh Shafiee, kiu ankaŭ dezajnis la elegantajn partopren-atestilojn. La plejparto de la programeroj daŭre spekteblas ĉe la jutuba kanalo de UEA, UEAviva, kie ĝis nun ili entute ricevis 4 947 vidojn. Detalaj priskriboj de la tuta evento legeblas ankaŭ en *Internacia Pedagogia Revuo* (2022/3, “VEKI-3: jam kutima kongresformo!”), *revuo Esperanto* de UEA (2022/10, “VEKI-3: laŭdo de l’ virtualeco”), *La Lampiro* (2022/4, “Virtuala kongreso de ILEI”), ktp.

Rilate al la ĉeftemo de VEKI-3, prelegis dum la kongreso i.a. Trevor Steele (“Eduki denaskulon”), Laura Brazzabeni (“Dulingva edukado kaj enmigrado”), Amri Wandel (“Denaska multlingva edukado”) kaj Ankica Jagnic (“Spertoj en edukado de denaskuloj”). Same rilate al la kongresa temo, Ermanno Tarracchini kaj Kolektivo Bernardoni rememorigis la figuron de itala kuracistino Antonietta Bernardoni, kiu siatempe konsilis lerni Esperanton kaj la signo-lingvon.

### **ILEI-Simpozio: “*Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado*”**

La ĉef-organizanto de la Simpozio estis estrarano Fernando Pita, kun la helpo de Laura Brazzabeni kaj Alessandra Madella. Estis entute 13 akademi-nivelaj prelegoj. La ĉefa prelego de la simpozio estis fare de Fabrizio Pennacchietti, kiu enkondukis la koncepton de “lingva higieno” rilate al Esperanto kaj instigis interesan debaton. Olta Totoni el Universitato Lancaster en Britio kaj Du Xin el Universitato Keio en Japanio prelegis respektive en la angla (pri Nasdaq de Anthony Burgess) kaj en la japana (pri internacia interkultura komunikado) kun traduko de Alessandra Madella, por la strategio de ILEI malfermiĝi al la ekstera akademika mondo.

### **Premio La Torre 2022**

Ceremonio okazis dum la kongreso por honoro Nitta Takamichi el Japanio, kiu gajnis la 3-an eldonon de Premio La Torre per sia esplor-raporto “Instrumetodo por Esperanto-kurso bazita sur metakognado kaj aktiva lernado”. Renato Corsetti prelegis rememore al la kar-memora figuro de ILEI-prezidanto Maŭro La Torre kaj Nitta donis unu-horan lecionon pri sia noviga instru-

metodo, kiu povos esti vaste imitata. Ĉeestis membroj de familio La Torre kaj ĵurianoj de la premio. Radojica Petrovic lanĉis la ideon kolekti libroforme ĉiujn eseojn de Premio La Torre.

### **Homa Ĉeno**

Dum la ILEI-kongreso estis ankaŭ lanĉita projekto de internacia Homa Ĉeno pri edukado, laŭ ideo de Maximiliano Garcia. Jam 116 homoj el kvar kontinentoj partoprenis en la tri unuaj partoj kaj ekis la pretigado de la kvara, kiu estos preta en novembro. Ĉiuj, kiuj ŝatas instrui kaj lerni, povas partopreni. Estas tre simple: prenu objekton larĝe rilatan al Esperanto kaj/aŭ al edukado pere de via dekstra mano el ekster la kadro, montru ĝin kaj transdonu ĝin al via dekstra flanko ekster la kadro. Eĉ saĝ-telefono sufiĉas. Bonvolu sendi vian (prefereble horizontalan) videeton al: [ilei.kongresoj@gmail.com](mailto:ilei.kongresoj@gmail.com)

Jen la tri unuaj partoj, kiuj havis grandan sukceson ĉe la publiko:

- 1) [https://www.youtube.com/watch?v=bPVxzp1Iw\\_M&t=6s](https://www.youtube.com/watch?v=bPVxzp1Iw_M&t=6s);
- 2) [https://www.youtube.com/watch?v=dQLSg1fJ\\_4&t=78s](https://www.youtube.com/watch?v=dQLSg1fJ_4&t=78s)
- 3) <https://www.youtube.com/watch?v=npm-tWBhHG&t=10s>

### **Kongreso-2023**

Pro la troa altiĝo de la kostoj en Massa, la estraro kaj la LKK decidis okazigi la ILEI-kongreson de 2023 fizike en Linjano Orsabra (itale: *Lignano Sabbiadoro*), plaĉa ĉemara urbeto en norda Italio, sufiĉe proksime de Venecio, kun tre taŭga strukturo kaj bonvenigaj aŭtoritatoj.

Laura Brazzabeni, ILEI-estraranino pri Kongresoj, kaj Brunetto (Bruĉjo) Casini, prezidanto de la LKK, jam vizitis la strukturon en Linjano (kun kiu ili jam kunlaboris dum antaŭaj kongresoj) kaj parolis kun la lokaj aŭtoritatoj. Laura kaj Bruĉjo ankaŭ jam adaptis la instruan projekton de ILEI “30 Oraj Horoj”, origine pensita por regiono Toskanio, al la novaj cirkumstancoj, varbante pliajn interesatajn homojn en la regiono de Linjano kaj en la najbaraj lokoj.

Ekis la konkretaj interparoloj kun la estraro de TEJO pri la kuna organizado de la kongresoj de TEJO kaj ILEI en Linjano. Jam ekzistas aparta ret-listo, estis fiksita ĉiu-monata renkontiĝo kaj komenciĝis la diskutado por baldaŭ subskribi komunan kontrakton inter TEJO, ILEI kaj la LKK.

La kongresan logotipon dezajnis Alessandra Madella.

Pli da informoj, fotoj kaj kunligo al la retejo de la kongreso, kie jam eblas aliĝi, troveblas ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info)

### **La Estraro**

Dum siaj regulaj retaj kunsidoj la Estraro diskutas kaj solvas diversajn kurantajn kaj aperantajn aferojn. Inter ili, lastatempe evidentiĝis la sekvaj du:

1) Estraranino pri landa agado Marija Jerkovic, kun la helpo de Renato Corsetti, estas aktive kontaktanta sekciestrojn por kolekti la plej novajn informojn cele al ĝisdatigo de la listoj de ILEI-membroj kaj ILEI-sekcioj, por povi baldaŭ okazigi komitatkunsidon. La estraro varme dankas la estraranojn pro ilia grava subteno en tiu ĉi delikata transira fazo al nova membro-administranto.

2) Alessandra Madella formis labor-grupon kun ILEI-membroj Cristina Bollini kaj Maximiliano Garcia por helpi la estraron pristudi la retejon de ILEI kaj plani ties renovigon/rekonstruon. La tuta plurmonata laboro estos farita senkoste kaj ĝia ĉefa celo estas igi la retejon pli alloga por junuloj kaj novaj eblaj membroj, krom pli efike prezenti la agadon de ILEI al eksteraj instancoj kiel UNESKO.

## **Kapabligo**

Daŭras la tradicio organizi ILEI-Forumojn por ĉiuj interesatoj kaj aktivuloj pri gravaj kaj aktualaj temoj. Mirejo proponis kiel temon por ebla estonta forumo, ke ni pripensu la malsaman aliron al la lernado de Esperanto en kulturoj, kiuj uzas ideogramojn.

## **Projektoj**

### **Esperanto-kurso en Senegalo**

Tio estas nova iniciato kaj komuna projekto de UEA, ILEI, Afrika Komisiono de UEA kaj Senegala Esperanto-Asocio sub la aŭspicio de la Kampanjo Hans Bakker. La koncepton ellaboris eks-prezidantino de ILEI Mireille Grosjean. La projekto celas okazigi preparan E-kurson oktobre-decembre 2022 antaŭ la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, okazonta de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 en Tieso. Vjaĉeslav Slavik Ivanov el Rusio atingis Senegalon la 6-an de oktobro 2022. Li gvidos Esperanto-kurson al 20 homoj ĉiun tagon inter la 17-a kaj la 20-a horo de lundo ĝis vendredo en la ĉefurbo Dakaro. Temos pri 45-hora ĉeesta instruado al lernogrupoj.

### **Esperanto-Kursaro "Tibor Sekelj" – Lernu Esperanton en via lingvo.**

La enkonduka leciono de la instruado de Esperanto en la araba de la Kursaro “Tibor Sekelj” estas ricevanta grandan publikan sukceson kaj iĝis la 9-a plej spektata video en la jutuba kanalo de ILEI (<https://www.youtube.com/watch?v=tMVZKaVGvIk&t=87s>). La estraro varme esperas, ke la ekzemplo estos vaste imitata. Pri la projekto (prezentado kaj instruado de Esperanto en via etna lingvo aŭ Esperanto), bv. rigardi al: <https://www.espero.ir/eo/kursaro/>

### **Universitata agado**

Daŭre regule okazas la ĉiumonataj sesioj de la “Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj” fare de la "Laborgrupo pri Esperanto en Universitatoj" de ESF/UEA/ILEI/TEJO kun IrEA. Ili okazas ĉiun unuan lundon de monato ekde la 13:30 laŭ UTC, kaj ĉiuj interesiĝantoj bonvenas. Jen la ligilo al la virtualejo en Zoom: <https://us02web.zoom.us/j/84086450145>; Kunven-Identigilo: 840 8645 0145; Pasvorto: la nomo de nia karega lingvo per minusklaj literoj. La kompletajn registraĵojn de la antaŭaj 32 sesioj vi povas spekti en la jutuba kanalo de UEA: <https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5> kaj la retejo de IrEA: <https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>

La aktoj de la akademiaj simpozioj 2020-21, redaktitaj fare de estrarano Fernando Pita, estas preskaŭ pretaj por eldonado libroforme.

## **Eldonado**

### **ISBN-kodoj de ILEI**

La estraro estas klopodanta kompreni kiel plej bone utiligi la ISBN-kodojn de ILEI por la publikado de la kongresaj aktoj kaj aliaj libroj pri edukado, kiel la traduko de verko de Antonietta Bernardoni.

### **Internacia Pedagogia Revuo (IPR) kaj Juna Amiko (JA)**

Jozefo Nemeth kaj Stefan MacGill brile prezentis la historion kaj pripensis la estonton de IPR (<https://www.ilei.info/revuoj/IPR-prelego.pdf>) kaj JA dum VEKI-3.

La estraro estas klopodanta pripensi kiel plej bone utiligi la malnovajn numerojn de IPR kaj JA ĉe la domo de Stano Marček. Pakaĵo iros riĉigi la kolekton de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio.

## **ILEI en la Reto**

La retejo de ILEI jam aperigas novaĵojn kaj informojn pri la kongreso de ILEI en 2023 (<https://www.ilei.info/>).

Daŭre evoluas la jutuba kanalo de ILEI “Esperanto + Edukado ILEI” (<https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI>). La subskribintoj estas nun 587 (kompare kun 461 antaŭ ses monatoj) kaj la vidoj estas 35 820 (kompare kun 23 211 antaŭ ses monatoj). Multas la videoj pri instruistoj kaj instruado de Esperanto el diversaj partoj de la mondo. Se ILEI-anoj ŝatas sendi mallongajn videojn pri siaj agadoj, ili estas tre bonvenaj! Bv. sendi la vide(et)ojn al la ĉefa organizanto de la kanalo, Alessandra Madella (a.madella@tiscali.it).

## **Kunlaboro kun enmovadaj institucioj**

Pola samideanino Małgosia Komarnicka, la Prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, sukcese okazigis la 10-an jubilean Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj, kies honora patrono ILEI estis.

### **Kun UEA**

Interesa diskutrondo inter la prezidantoj de UEA (Duncan Charters), TEJO (Albert Stalin Garrido) kaj ILEI (Ahmad Mamduhi) pri diversaj manieroj kunlabori okazis dum VEKI-3.

Kanada samideanino Suzanne Roy reprezentis ILEI dum la Movada Foiro de la Universala Kongreso de UEA en Montrealo.

Komitatanino Maria Belošević tre sukcese organizis la tradician Tagon de Lernando dum la montreala UK.

La nova estrarano de UEA, kiu respondecas pri la rilatoj kun ILEI, estas Aurora Bute el Rumanio, kiu jam ekpartoprenis niajn estrar-kunsidojn kiel la nova Observanto de UEA ĉe ILEI.

### **Kun Ĉina Radio Internacia (CRI)**

Alessandra Madella daŭre verkas por Ĉina Radio Internacia. Laŭ peto de la radio, ŝi estas ankaŭ pretiganta videon pri la Silka Vojo kune kun Maximiliano Garcia. La prezidanto de ILEI, Ahmad Mamduhi, ankaŭ kunlaboris kun ĈRI por realigi videojn por la Internacia Tagoj kontraŭ Analfabeteco (<https://www.youtube.com/watch?v=0XmEwFVV384&t=9s>) kaj la Monda Instruista Tago (<https://www.youtube.com/watch?v=Krc5itg7BCY&t=151s>).

### **Kun TEJO**

Fernando Pita estas konfirmita kiel la observanto de ILEI ĉe TEJO kaj li estis aldonita por tio al la estrara listo de TEJO.

## **Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj**

### **ILEI ĉe UNESKO**

La instrua projekto “30 Oraj Horoj” de ILEI, same kiel la Kungfua Kuniklo kaj Edukado.net, sukcese trapasis la unuan selektan fazon de la Premio Hamdan de UNESKO, ricevante la plej multon da poentoj inter la tri projektoj oficiale subtenataj de UEA. La sukceso de niaj tri projektoj garantias multe da videbleco al la Esperanto-movado kaj pensigas pri pliaj manieroj kunlabori. Interesa diskutrondo pri tio kaj pri la rilato inter ILEI kaj UNESKO okazis dum VEKI-3, dank’ al la helpo de spertaj fakuloj.

Alessandra Madella pretigis novan trilingvan faldfolion por UNESKO. Samideanoj diskutis ĝin dum la diskut-rondo pri UNESKO de VEKI-3 kaj la jar-kunveno de la itala sekcio de ILEI ĉe la Itala Kongreso de Breŝjo. Ĝi estis ankaŭ disdonita dum la Movada Foiro okaze de la montreala UK kaj la Internacia Junulara Kongreso en Nederlando.

### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Vicprezidantino de ILEI:

Alessandra Madella

Prezidanto de ILEI:

Ahmad Reza Mamduhi

2022-10-15